



# TEA-BULTENO

9<sup>A</sup> JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2006

NUMEROJ 11-12

Novembra Programo	
3 - vendredo	<b>16h30</b> - disdono de diplomoj kaj mem-brokartoj <i>Prezento de filmo de Edvige Ackermann "Florenco 2006, ĉijara Ĉefurbo de Esperantujo"</i>
7 - mardo	<b>17h00</b> - Convegno "Energia e sviluppo sostenibile" c/o Salone Seminari, Centro Internazionale di Fisica Teorica, Strada Costiera 11, organizzato dal Centro UNESCO di Trieste (vd. pg. 3)
10 - vendredo	20h00 - Kartludado
ekde vendredo 10 <sup>a</sup> ĝis dimanĉo 12 <sup>a</sup>	Ĉiuj kune, per trajno, al Milano, por kunfesti la 100-jariĝon de la tiea grupo kaj kunĝui belegan programon!
14 - mardo	20h00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA
17 - vendredo	20h00 - Gramatika problemo: la akuzativo - niaj plej oftaj eraroj
19 - dimanĉo	Marcelo Trampuh invitas vin al gustumado de nova vino en Kaŝtelir (Kroatio)
21 - mardo	<b>17h30</b> - <i>Sala Baroncini - Via Trento, 8</i> La homo elpensas la skribon. De ideogramo al aboco. <i>Prelego de d-ro Romano Bolognesi</i>
24 - vendredo	<b>16h00</b> - <i>Scuola Sup. di lingue moderne per interpreti e traduttori - via Filzi, 14</i> Kiel klasifiki la prepoziciojn? Nova propono <i>Prelego de prof. Fabrizio Pennacchietti</i>
28 - mardo	20h00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA
29 - merkredo	<b>17h30</b> - <i>Sala Baroncini - Via Trento, 8</i> Lingvoj kaj socio <i>Prelego de d-ro Romano Bolognesi</i>
Decembra Programo	
1 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> , esperante, itale kaj triestradialekte
5 - mardo	20h00 - Preparoj por Krip-ekspozicio
8 - vendredo	Sidejo fermita
12 - mardo	<b>18h00</b> - <b>Inaŭguro de la Ekspozicio pri Kripoj kaj bondezirkartoj</b> <b>KRISTNASKO TRA LA MONDO</b>

15 - vendredo	20h00 - Naskiĝdatreveno de <b>Lazaro Ludoviko Zamenhof</b> : literaturaj valorajoj en Esperanto
19 - mardo	20h00 - Verboj kun prepozicioj
22 - vendredo	20h00 - Festo kun Paĉjo Kristnasko
26 - mardo	Sidejo fermita
29 - vendredo	19h30 - Ferma ceremonio de la celebradoj por la 100-jara datreveno de Triesta Esperanto-Asocio kaj ... kune ni adiaŭu la Jaron 2006 <sup>an</sup> !

## *Kara Jea-anaro! Kara Legataro!*

Antaŭ ni staras nur du monatoj, kaj poste ni transsaltos al la 2007<sup>a</sup> jaro! Por triesta anaro, engaĝita en la preparlaboroj por festado de la 100-jariĝo de TEA, la baldaŭ finiĝonta 2006<sup>a</sup> j. ŝajnis eble pli longedaŭra ol kutime. Multegis la laboroj, eĉ pli multegis la problemoj renkontitaj survoje, kiujn oni, vole-nevole, devis alfronti kaj, en tiuj okazoj, elturniĝadi por trovi elirejon, kiel eble plej rapidmove kaj favore al nia cirkonstancaro.

Ni ne antaŭvidis tiom da malfacilaĵoj, eble pro troa entuziasmo ni ne kapablis esti longvidaj aŭ, eble, iom tro facilanime iniciatis kelkajn aferojn, antaŭ kiuj poste ni staris kiel Davido antaŭ Goliato. Sed, fine, ĉu Fortuno ĉu iaj internaj fortoj helpis nin superi ĉion, ĝis atingo de finfina, ege kontentiga rezulto.

Sed zorga, konstanta kaj alcela semado devus esti premiso de estontaj abundaj rikoltoj. Ĉu tio realiĝos? Ĉu nia klopodado ricevos ian premion? Nu, eble tro fruas, por ricevi certan respondon: ni esperu, ni daŭre esperu, ke nia laborado ne restu senfrukta, nome ke kion ni faris dum la tuta jaro iel kontribuis plialtigi la konon pri nia afero, plikonsciigi nian urbanaron pri la lingva problemo tutmonda kaj pri la solvo Esperanto, pliantenti niajn instancojn, ĉu komunumajn ĉu provincajn ĉu regionajn, pri la kultura kaj socia valoro de agado de Asocio kia la nia. Nu, povas esti, ke ĉio ĉi estas kaj restos nura revo, sed laŭ niaj povo kaj fortoj ĉio ebla estis farita, por ke Triesta Esperanto-Asocio, kiel eble plej inde kaj digne, staru sur pinta pozicio kaj ricevu ĉiajn honorojn okaze de festado por la unuaj 100 jaroj de sia ekzistado.

Kaj ankoraŭ ne estas skribita la vorto "fino", ĉar per aliaj eventoj oni daŭrigas: nome, per la serio da prelegoj (jam komencitaj), fare de d-ro Romano Bolognesi, pri homo kaj komunikado, kaj de prof-ro Pennacchietti, per la ĝemeliga ceremonio kun la grupo de Rijeka, kio plifirmigos nian multjaran kunlabor-agadon, k.a. (vidu la kalendaron!). Do, ĝis lasta momento ni ĉiuj KUNE festu nian TEA-n!!!

*La redaktanto fLda*

## Kiam temas pri fremdaj lingvoj, ni ĉiuj iĝas masohistoj!

*Claude Piron intervjuita de abruza tagĵurnalo*

La 1<sup>an</sup> de septembro *ABRUZZI OGGI* (Abruzo Hodiaŭ) intervjuis eminentan fakulon pri internacia komunikado, nome Claude Piron el Ĝenevo, rilate al lingvaj problemoj internacikampe. Dum jaroj li estis tradukisto por la Internaciaj Agentejoj de Unuiĝintaj Nacioj, poste li ekokupiĝis pri internacia kaj interhoma komunikado ĉe Psikologia Fakultato en la Universitato de Ĝenevo. La abruza tagĵurnalo, kies direktoro estas Vittorio Mangione, tre atenteme prikonsideras la aktualan situacion rilate al problemoj de lingva kaj kultura defendado, kio, male, estas tute subtaksata de la naciaj gazetaro kaj amas-komunikiloj.

Klare okulfrapas en tiu intervjuo tiu estiĝanta situacio, kiun oni povas difini kiel "masohisman" flankon de nia socio. La nuntempa sistemo de internacia komunikado spegulas la negativajn karakterizojn de la homa socio, kiel ties masohismon, ties emon agadi tute malracie, la forton de ĝia inerteco kaj la rifuzon alfronti la realon. Nia socio, diras Piron, elektis por komunikadi unu el la lingvoj malpli taŭgaj por internacia uzado, nome la anglan, lingvon malfacilan eĉ por la denaskuloj mem de anglosaksaj landoj. Verdire ne temis pri libera elekto, ĉar ja estis tiu inerteza forto kiu antaŭen trenadas. 95% de la homaro rezignacie akceptas sian lingve subiĝantan pozicion, dum la ceteraj 5 procentoj, konsistantaj el denaskaj anglaparolantoj, konsideras tute natura la fakton ke ĉiuj alilingvuloj surprenu la taskon penadi por ebligi interkomunikadon. Eĉ pli: penadi, konsciiĝante pri la ĉiam pli evidenta defalo de propra lingvo.

Pri instruado de lingvoj en lernejoj oni entute ne debatas. Ĉies atenton oni kaptas iluziante, ke la angla lingvo solvos la lingvan problemon en la mondo kaj ke ĝin, kiel komunikilon, eblas elstudi lerneje. Piron proponas, ke oni rekomendu al civitanoj lerni esperanton, ĉar eblas relative rapidmaniere disponi je plaĉe efika metodo por komuniki kun parolantoj de aliaj lingvoj kaj ke en lernejoj oni eklernu lingvojn, ne konsiderante ilin kiel nurajn ilojn de komunikado, sed kiel instrumentojn kulture pliriĉigajn, survoje al tuthomara interkompreniĝado. Absurdas, ke en la nuntempa mondo 90-procenta studentaro el superaj lernejoj elspezas tiom da energioj por lerni la anglan lingvon, ignorante ĉiujn aliajn kulturojn kiujn oni povas akiri per lingvaj kursoj. Kaj eĉ pli absurdas, ĉar, post tiu penado, la plejparto ne estas en la kondiĉoj interkomuniki, reale kaj samnivele, sur tutmonda tereno.

Esperable, daŭrigas Piron, la nuna situacio ĉe EU, kun ties novaj membro-ŝtatoj kaj sekve kromaj lingvoj, reliefigos la neceson serioze ekzameni ĉi problemon, sed eble mankos la kuraĝo starigi la bazajn demandojn. Bedaŭrinde la homoj estas konservativaj: ŝanĝi la aktualan lingvan ordon (aŭ, pli bone, malordon) signifas ŝanĝi pensmanieron kaj tiu ŝanĝiĝo estas "ago psike kosta", kiel asertas Janet.

Esperanto, ĉiukaze, povas utili en la lernejoj, danke al sia propedeŭtika eco, ankaŭ por lerni aliajn lingvojn. Nur unu afero tamen esence malhelpas la utiligon de esperanto, kiel planlingvo: ties, senbaze asertita, manko de kulturo.

Tiun ĉi tezon firme subtenis la Eŭropa Komisiito pri plurlingvismo, Jan Figel, por forŝovi esperanton el sia raporto. Ke tio estis proksimuma stultaĵo, pretekstata de kiu tute ne emas aŭskulti eĉ ioman diskuton pri la superregado de la angla, estas klara al ĉiuj, escepte de Figel mem.

Tamen, ene de Eŭropa Unio, oni ne nur argumentadas pri temoj kiel amikeco aŭ nespecifaĵoj, sed ankaŭ pri pli komplikaj situacioj, ĉu ekonomiaj, ĉu juraj aŭ teknikaj. Do, eliĝas problemoj pri faka terminologio. Pri ĉi praktika problemoj neniuj parolas, respondante al tio plejfoje per kutimaj banalaĵoj. Piron opinias, ke ja la problemoj ekzistas kaj ke serioze ĝi devas esti pritraktata, sed tamen eblas ĝin solvi per la teknikoj de lingva planado, kiujn oni jam alprenis por naciaj lingvoj kiel la estona kaj kiuj ebligis al la hebrea, havanta nur 5 mil vortojn, fariĝi moderna lingvaĵo.

La reala problemoj estas naski ĉe la publiko, kaj sekve ĉe la politikistaro, pli grandan respekton al propra lingvo kaj pli grandan atenton al internacia lingva problemoj, per disvastigado de la ideoj pri lingva demokratio kaj, precipe en la anglosaksa mondo, pri novtipa kulturo de kompreno kaj kompreniĝo. Nepras bone klarigi al si la signifon de tiuj bazaj konceptoj pri lingva demokratio kaj homaj rajtoj en tiu ĉi kampo.

Urĝas, ke ĉiam pli da personoj konsciiĝu pri la defendendaj kulturaj valoroj, antaŭ ol tiuj lingvaj, kaj ke oni kontraŭstaru, antaŭ ol ili estu senrimede endanĝerigitaj. Daŭrigi, intertempe, je superaj niveloj, rifuzi la solvon "esperanto", sen scio pri ties potencialoj, ŝajnas eĉ tro absurda por esti akceptita.

Ĉi tiuj lastaj konceptoj, eldiritaj de Piron, trovis plenan konsenton ĉe la intervjuito, Giorgio Bronzetti, kunordiganto de Asocio *Allarme Lingua* (Alarmo Lingvo), kiu klopodas favore al defendado de la lingvoj, unualoke de la itala, kaj de la kulturoj, endanĝerigataj de la sintrudemo de la angla lingvo kaj anglo-usona kulturo. Fakte ne plu temas pri protektado de okcitanaj minoritatoj en la regiono Piemonto kontraŭ la itala lingvo, sed la batalinio nuntempe alturniĝas al defendo de la pluvivado de la italaj lingvoj kaj kulturo. Kiu kredas, ke ankoraŭ legindas Dante Alighieri en ĉiuj lernejoj dum la venontaj jaroj, tiu certe samopiniis kun Piron kaj Alarmo Lingvo.

**Renato Corsetti**

Università La Sapienza di Roma

**EL DISVASTIGO - Presagentejo por dissendado de novaĵoj, artikoloj kaj dokumentoj pri komunikadaj problemoj**

Viale A.Moro 37 66013 Chieti tel. 0871561301

Responda Direktoro: Mario D'Alessandro;

Eldona Direktoro: Giorgio Bronzetti

info613@disvastigo.it

### KURTA KINOESPERANTO FESTIVALO

Ni rememoras al vi, ke estas tempo ĝis la 15<sup>a</sup> de decembro 2006 sendi sian kontribuon por partopreni en la internacia konkurso pri kurtaj filmoj, organizita de TEA, celebre de ties 100-jariĝo. Regularo, aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe [www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/](http://www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/) aŭ ĉe la grupa ttejo: [//it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantista-triestina](http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantista-triestina) aŭ kontaktante [noredv@tele2.it](mailto:noredv@tele2.it)



## **Grava funebro trafis Esperantujon: mortis unu el la plej elstaraj poetoj de nia movado, William Auld**

La 11<sup>an</sup> de septembro forpasis en Skotlando poeto, eseisto, unika tradukisto, kiun - pro lia neimitebla kaj alt-ranga stilo - oni eĉ kandidatigis al Nobel-premio pri Literaturo.

Naskita en Suda Anglio, urbo Dollar, la 6<sup>an</sup> de novembro 1924, li eklernis Esperanton en 1937, aktivigante tamen nur en la jaro 1947. Tiam ekis lia fekunda laborado sur la literatura tereno, kaj per originalaĵoj kaj per tradukaĵoj William Auld elstare kontribuis al pliriĉigo de la Esperanta kulturo.

En la Jubilea Jaro 1987 li estis elektita kiel Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio.

Auld aŭtoris, tradukis aŭ redaktis plurajn dekojn da libroj. Li estas unu el la plej ofte premiitaj partoprenintoj de la Belartaj Konkursoj de UEA. Lia ĉefverko estas la poeziaĵo "La infana raso" (1956), kiu estas ĝenerale konsiderata la pinta atingo de la Esperanta literaturo kaj kiu, pro sia humanisma kaj porpaca mondrigardo, fariĝis kvazaŭ "nacia epopeo" esperantista. Aliaj poemaroj de Auld estas "Spiro de l' pasio" en la kolekto "Kvaropo" (1952), "Unufingraj melodioj" (1960), "Humoroj" (1969), "Rimleteroj" (kun Marjorie Boulton, 1976) kaj "El unu verda vivo" (1978). Liaj kolektitaj poemoj aperis en la volumo "En barko senpilota" (1987).

Auld redaktis du eldonojn de "Esperanta antologio" (1958 kaj 1984), la panoraman antologion de Esperanto-tekstoj "Nova Esperanta krestomatiko" (1991) kaj kelkajn aliajn antologiojn. Li verkis amason da eseoj, artikoloj kaj prelegoj por multaj gazetoj kaj Esperanto-aranĝoj, kaj ili aperis ankaŭ libroforme en "Facetoj de Esperanto" (1976), "Pri lingvo kaj aliaj artoj" (1978), "Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto" (1979), "Vereco, distro, stilo: Romanoj en Esperanto" (1981), "Kulturo kaj internacia lingvo" (1986) kaj "Pajleroj kaj stoploj" (1986). En 1988 aperis lia enkonduko al la Esperantaj lingvo kaj movado "La fenomeno Esperanto".

Abunda estas ankaŭ la rikolto de tradukoj, inter kiuj elstaras "Kantoj, poemoj kaj satiroj" de R. Burns (1977), "Epifanio" (1977) kaj "La sonetoj" (1981) de Shakespeare, "Aniaro" de H. Martinson (kun B. Nilsson, 1979), "La robaioj" de Omar Kajam (1980), "La graveco de la fideliĝo" de Oscar Wilde (1987) kaj la trivoluma "La mastro de l' ringoj" de J.R.R. Tolkien (1995-1997), kiun li mem konsideris sia traduka ĉefverko, dum plej kara al li estis "Jurgen" de J. Branch Cabell (2001).

Auld redaktis plurajn revuojn, i.a. "Esperanto en Skotlando" (1949-1955), "Esperanto" (1955-1958, 1961-1962), "Monda Kulturo" (1962-1963), "Norda Prismo" (1968-1972), "La Brita Esperantisto" (1973-1999) kaj "Fonto" (1980-1987), kaj kunlaboris kun aliaj gazetoj. Li verkis sennombrajn recenzojn kaj kelkajn lernolibrojn, i.a. "Esperanto: a new approach" (1965) kaj "Paŝoj al plena posedo" (1968).

William Auld estis vicprezidanto de UEA (1977-1980), membro de la Akademio de Esperanto (1964-1983) kaj ĝia prezidanto (1979-1983). En 1995 li ricevis la Premion Deguchi, en 1998 li fariĝis la unua Esper-

antisto de la Jaro en la voĉdonado de "La Ondo de Esperanto", dum en 2000 li gajnis la FAME-kulturpremion. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanta PEN-Centro.

Li daŭre vivos inter ni per liaj verkoj, neniam malaktualigontaj kaj ĉiam pliriĉigontaj la spiriton kaj menson de la legontaro.

*El Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## **Popolaj tradicioj en nia regiono Friulo-Julio Venetio**

Eĉ nuntempe, dum nia tute racia kaj materiisma epoko, pretervivas multnombraj tradiciaj festoj, aparte tie, kie rilato al plantoj kaj grundo estas tre proksima, nome la kamparo.

En la antaŭmonta zono de Alpoj, aparte signifaj estas tiuj je la komenco de printempo, kaj tute similas al festoj okazantaj en Friulo, ĉe vilaĝoj laŭvale de l' rivero Natizone [Natizone], ĝis Karsto ĉe *Dolina*, proksime de Triesto.

En Friulo, dum festo nomata *MAJ*, oni starigas, nokte de la unua maja tago, arbon por bonvenigi ekigantan printempon, kio signifas simbiozon inter homo kaj naturo. Kune junuloj realigas tiun tradicion de la *scjarnete* [sĉjarnete], nome engrundigi branĉon antaŭ la pordo de l' amatino, konforman al ties karaktero: florojn por belulinoj, urtikon por la mordantaj, kuracajn herbojn por tiuj ĉiam malsanetaj ...

En *Dolina*, kie la festo ricevas la nomon de *MAJENCA*, ĝi daŭras tutan semajnon ekde la komenco de majo: ekspozicioj, baloj, koncertoj, muzikbandoj estas inda kadro por *MAJ*, la granda abio-trunko, preskaŭ dek kvin metrojn alta, tute ornamita per aro da arbusto-branĉoj, oranĝoj kaj brilaj lumoj, kiun pinte kronas branĉaro de ĉerizujo. La preparado estas specifa tasko de elektitaj junuloj, kiuj, dum la nokto de sabato, starigas *MAJ*-on al la ĉielo: tiu pruvo de forto kaj vireco simbolis/as transiron de l' junularo al la adulta aĝo. Dimanĉe, nur la novplenaĝuloj kune kun deksejaraj junulinoj rajtas ekdanci en etoso de ĝojo kaj feliĉo.


*MAJENCA*, festo de Printempo kaj Juneco, devenas el praaj paganaj ritoj, celebrantaj naturo-renaskiĝon, fekundecon kaj kontinuecon de la vivo-ciklo.

Analogaj tradicioj krome troveblas en Anglujo, kie tiuj nomiĝas *JACK-IN-THE-GREEN*, en Francio, *FENILLU*, en Germanio, *MOSMANN*.

Perdinte sian praan sakralan karakteron, kiu tamen pludaŭris en la posta kristana simbologio, tiuj tradicioj atestas pri fortaj ligoj inter homo kaj kamparo, ekde la bona malnova tempo, pri kiu ni nun kelkmaniere nostalgias. Eble.

*VIGLO*

**Martedì 17 novembre, ore 17** - Organizzato dal Club UNESCO Trieste, in occasione della **Settimana dell'Educazione all'Energia sostenibile**, una serie di interventi di oratori qualificati presenterà al pubblico le problematiche riguardanti il risparmio energetico, l'uso efficiente dell'energia e delle fonti di energia alternativa, soprattutto nei settori dei consumi domestici e dei trasporti, allo scopo di sensibilizzare la cittadinanza e soprattutto di stimolarne la riflessione su questo problema di grande attualità ed importanza. I soci sono invitati ad intervenire.



## Ŝnova Kuko

Jen simpla, malmultekosta, facile kaj rapide far- ebla torto, kiu certe ĝoj- igos viajn infanojn, pli- dolĉigos la severan mie- non de via edz(in)o, aŭ konsolos vin post tago pasigita deĵoranta por estro daŭre grumblanta, aŭ post alveno de ĵus bakita ŝtata imposto, tuj pagenda. Kaj atentu, inter la ingrediencoj estas nek ovoĵoj nek grasaĵoj, do, tial, preskaŭ kontraŭkolesterola!

### INGREDIENCIOJ

- 200 g da faruno
- 250 g da sukero
- 100 g da kakaopulvoro
- 125 g da muelitaj aveloj
  - 1 taso da lakto (ĉirkaŭ 250 ml)
  - 1 pinĉeto da cinamo
  - 1 raspitaĵo de oranĝo
  - 1 saketo da bakpulvoro
  - aprikota marmelado

### PREPARADO

Bone kummiksi farunon, sukeron, kakaopulvoron, muelitajn avelojn, pinĉeton da cinamo, oranĝan raspitaĵon. Atentante ke ne formiĝu grumeloj, aldonu la lakton, daŭre ĉion miksan- te. Je la fino enmetu la bakpulvoron, zorgante ke ĝi bone kummik- siĝu kun la pasto.

Buterumu kaj poste sukerumu tortujon rondan, enverŝu la pa- ston kaj enŝovu en antaŭvarmigita bakformon je ĉirkaŭ 180°. Kuir-tempo: ĉirkaŭ 30-40 minutoj. Post elformigo, lasu la ku- kon malvarmiĝi.

Post ties kompleta malvarmiĝo, tranĉu la kukon horizontale, por akiri du tavolojn. La bazan tavolon ŝmiru per aprikota mar- melado, kaj poste ĝin kovru per la dua tavolo kaj ... bonan gu- stumadon!

## 100 Jaroj de Esperanto en Milano

Ĉiuj estas invitataj kunfesti ĉi gravan datrevenon kun la Milana esperantist- aro. Jen la programo, de la 10<sup>a</sup> ĝis la 12<sup>a</sup> de novembro:

### Vendredon la 10<sup>an</sup>

15h00 - renkontiĝo ĉe la Katedralo, por kuna urbovizito;  
21h00 - ĉe Teatro *DAL VERME*, via S. Giovanni sul Mu- ro, 2: Muzik-koncerto (Nepras sinanonco!).

### Sabaton la 11<sup>an</sup>

En la preleg-salono de Muzeo pri Nuntempa Historio, via Sant'Andrea 6

10h00 - Malferma ceremonio per:

1. Bonveniga saluto de aŭtoritatuloj;
2. Prelego de d-ro Renato Corsetti, pri "100 Jaroj de Esperanto ekster Milano, nome tra la mondo";
3. Prelego de prof-ro Carlo Minnaja, docento ĉe la Universitato de Padova, pri "Lombardaj kontribu- aĵoj al la Esperanta literaturo".

12h30 - Bufeda paŭzo.

14h30 - 18h45: Posttagmezo dediĉata al historio, kultu- ro, muziko ktp.

1. Mallonga prezento de la historio de Esperanto en Milano, zorge de Ermigi Rodari;
2. Esperanta Teatro: post la sukcesa prezentado dum la UK en Florenco, ree surscenejiĝos **Giuliano Turone**;
3. Du kurtfilmoj, esperantlingve, de la reĝisoro Alber- to Grossi: "Emocioj" kaj "Kio estas sub la nuboj";
4. Disdonado de la diplomoj, al ekzamensukcesintoj;
5. Dum la paŭzoj, muzikinterludoj, ĵazstilaj, fare de *Dario Polerani* kun ties ensemblo.

20h00 - Komuna vespermanĝo ĉe urba restoracio.

### Dimanĉon la 12<sup>an</sup>

9h00 - urba rigardado kun ĉiĉeronado aŭ

9h00 - Di-servo en Esperanto kaj poste kiel supre.

Nenio el la programo estas pagenda, escepte de la kon- certo kaj vespermanĝo (respektive 5€ kaj 35 €). Kiel eble plej haste, bonvolu antaŭanonci vin, por la mendo de la hotel-ĉambroj. Jen kelkaj loĝeblecoj:

Hotel Sunflower - 4-stela - Lugano 10 - 1-lita: € 95; 2-lita: € 130 (matenmanĝo inkluzivita)

Hotel Spadari al Duomo - 4-stela - Via Spadari 11; 2-lita: € 168 (matenmanĝo inkluzivita)

Hotel London - 3-stela - Via Rovello 3 - 1-lita: € 80; 2-lita € 120 (sen matinmanĝo)

Hotel Rio (inferiore) - 3-stela - Via Mazzini 8 - 1-lita: € 60; 2-lita € 110 (matenmanĝo inkluzivita)

Por junularo: JunularGastejo - Via Salmoiraghi 1 - € 19 (matenmanĝo inkluzivita) (+ € 5 de aliĝo, se oni ne jam membras en tiu asocio).

Utilaj kontakt-adresoj: Circolo Esperantista Milanese - Via De Predis, 9 - Telefono: +39 - 02 58100857 - c.c.p. 26448209 Per iscrizioni o informazioni rivolgersi a: **Conti Giovanni** - conti.giovanni@libero.it - Tel. 02 66301958 - fax 02 66302110;

**Rodari Ermigi** - ermigi@infinito.it - Tel. 02 2364190



**vanità**

**Ina vestajaro  
Ĉio por novedzi-**

**VANITÀ sas**  
di Dodi B. & Dei Rossi R.  
34122 TRIESTE  
Corso Italia, 37 - Tel. 040 632340  
Cod. Fisc. e part. IVA 00082530320



**Al vi ĉiuj korajn bondezirojn  
de Serenaj Festotagoj!**

**Ni revidos nin  
mardon la 10<sup>an</sup> de januaro 2006!**

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO  
Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste  
tel/fakso: +39 040 763128  
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it  
Grupa ttt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina  
Poŝta adreso: CP 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro  
IT-34132 Trieste - Italia  
Poŝtĉekkonto N° 10834349